„Mutig vorwärts!“ „Kuraĝe antaŭen!“

Aŭstria Esperantisto

(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Aŭstria Esperanto-Delegitaro kaj Esperanto-Delegitaro de Wien.

4a jaro. No. 6 Monata Junio 1927

Redaktejo kaj administrejo: Korneuburg ĉe Wien, Postfach.


Konto ĉe poŝtŝparkaso aŭstria n-ro D-123.826.

Jarabono (komencebla ĉiumonate): Por aŭstrianoj aŭ. S 4.30, germanlandanoj RM 3.—, alilandanoj sv. fr. 4.—; ponumere: por enlandanoj 40 aŭ. g., eksterl. 50 aŭ. g.

Nicht zeitgerechte Abbestellung unseres Organs verpflichtet zum Weiterbezug.

7. Österreichische Esperanto-Tagung.

Eröffnungssitzung im Neuen Saale der Hofburg.



Von links nach rechts. 1. Reihe: Lektor Mayer für Montan. Hochschule Leoben; Prof. Dr. Christanell, 2. Vorsitzender; Min.-Rat Dr. Kramer f. Bundesminister f. Unterricht Richard Schmitz; Min.-Rat Dr. Schneider f. Bundesminister f. Handel u. Verkehr Dr. Schürff; Hofrat Leisching für Bürgermeister Seitz und die Stadt Wien, ferner als Vorsitzender d. Volksbildungsvereines; Vizekanzler a. D. Walter Breisky für Bundeskanzler Dr. Seipel; Bundeskanzler a. D., Polizeipräsident Schober; Nationalrat Kunschak; Univ.-Prof. Dr. Ettmayer f. d. Universität; Oberinspektor Steiner, 1. Vorsitzender der Tagung. 2. Reihe: Amtsrat Dr. Möstl f. Landeshauptmann Dr. Buresch und den Fortbildungsschulrat für N.-Ö.; Hofrat Dr. Winternitz f. d. österr. Bundesbahnen; Hofrat Prof. Dr. Dr. Schumann f. d. Technische Hochschule; Prof. Dr. Longo; Landesschulinspektor Hofrat Dr. Wollmann, Direktor der Staatsprüfungskommission für Esperanto, als Vertreter des Präsidenten des Stadtschulrates Wien, Nationalrat Glöckel; Dr. Pilz f. d. Journalisten- und Schriftstellerverein „Concordia“; Direkt.-Rat Dr. Becker f. d. Wiener Straßenbahnen; Chefredakteur Lill des „Eisenbahner“ für Nationalrat Tomschik; Oberst Zwach.

VII. AŬSTRIA ESPERANTO-KONGRESO.

Kiel antaŭaranĝo al la kongreso la prepara komitato solene malfermis en la grandmagazeno A. Herzmansky, Wien, VII., Mariahilferstr. 26 (Stiftg. 3) imponan E.-ekspozon. Ĉi tiun ebligis al ni sole la ĉefo de la firmo, kom.-kons. Falnbigl, kiu ne nur senpage disponigis al ni la duan etaĝon de sia ĉefdomo, sed ankaŭ elspezis multan monon, por ke ni havu indan ekspozon. Prokuristo Herzog ĉiam en la nomo de sia ĉefo prizorgigis por ni afable, kion ajn ni bezonis, kaj disponigis al ni s-ron Winter, kiu konsilis kaj helpis nin ĉiuokaze. La ĉefdekoraciisto de la firmo s-ro Sobek belege aranĝis la ekspozejon kaj la alirejojn. Al ili ĉiuj precipe al s-ro Herzog nian dankon pro ilia helpo kaj afableco.

Alproksimiĝis la 27. de majo. Granda ekscitiĝo. La 25. la ekspozo, kiel ĉiuj similaj aranĝoj, montris bildon malesperigan. Nenio preta! Sed la 26. — festotago — 16 personoj laboris kaj vespere finis la verkon. En la preparaj laboroj helpis ĉefe f-ino Cipera, s-roj Bischof, Frey, Postl kaj Smital, kiu lasta elspezis multajn monon kaj tempon por la desegnado de la landkarto (UEA. kaj SAT.-delegitoj), grandaj tabeloj pri disvastiĝo de la lingvoj, UEA., Radio, kongresoj ktp. La materialon por la ekspozo disponigis grandparte „Danubio“, la librovendejoj Foltanek kaj Wallishausser, s-ro Vasta, „Ofichavantoj“ kaj la tutan „lernejofakon“ s-ino d-rino Smital-Domonkos. La aranĝon de la ekspozo kunhelpis s-ino Smital kun du knabinoj el sia E.-kurso, f-inoj Cipera, Gyra, Kohn, Metzger kaj s-roj Bischof, Bernfeld, Ĉech, Klein, Postl, Smital, Ultmann kaj Werner.

Al pli ol 450 eminentuloj kaj publikaj estraroj, al ĉiuj lernejoj en Wien (pli ol 600) kaj al multaj unuiĝoj la komitato dissendis senpage la kongresnumeron de A. E. kiel certe bonan varbilon. Grandparte faris ĉi tiun laboron Bischof, Cipera, Smital, Steiner kaj „Danubio“.

Intertempe la „Honora Komitato“ pligrandiĝis per jenaj personoj:

S-ino Helene Granitsch;

Eksministro Eduard Heinl, prezid. de Radio-Verkehrs A. G. (Ravag);

Ambasadoro kaj rajt. ministro Ludwig, estro de Liglanda Gazetservo en la kanceliera oficejo;

Rektora moŝto prof. d-ro Joseph Marx de la „Akademio por muziko kaj aktora arto“;

Kortega kons. Georg Stern, vicprez. de Ravag.

La 27. de majo Esperanto-flagego (12 m longa) flirtis en Mariahilferstr. (ĉefa komerca strato en Wien) de la grandmagazeno Herzmansky kaj montris krom la afiŝoj en la elmontraj fenestroj al la publiko, ke okazas Esp.-ekspozo. Jam dum kelkaj semajnoj s-ro Smital ĉiun mardon per Radio diskonigis la necesajn informojn pri ekspozo kaj kongreso.

Antaŭ la 11 h. alvenis iom post iom 60 de la invititaj eminentuloj al la malfermo de la ekspozo en la refreŝiĝejon de la magazeno, kie la ĉefo gastigis la alvenintojn. Je la 11 h. la prez. de la komitato s-ano Steiner salutis la gastojn jene:

„Tre estimataj gastoj!

Estante prezid. de la loka komitato por la VII. Aŭstria E.-kongreso mi havas la honoron saluti vin. Estas al mi speciala plezuro saluti la protektantojn, nome s-rojn min.-kons. d-ro Komenda, anstataŭante la ministron por instruaferoj Schmitz, sekc.-ĉefon inĝ. Gelse por la ministro por komerco kaj trafiko d-ro Schürff, distriktestron d-ron Ritter por la landestro por Niederösterreich d-ro Buresch kaj la membrojn de nia honora komitato, plue la aliajn eminentulojn el la publika vivo speciale la s-rojn legacian-kons. d-ron Gooss, reprezentante la germanan ambasadoron grafon Lerchenfeld, kort.-kons. d-ron Wollmann por la prezid. de Wien-a lerneja konsilantaro, deputito Glöckel, min.-kons. d-ron Hell por la ministro por sociaj administraj aferoj d-ro Resch, sekc.-ĉefon Obelhör el la kanceliera oficejo, rektoron prof. Müllner de la

Akademio de la belaj artoj, vicprez. de Ravag kort.-kons. Stern, ĝen.-dir. Czeja de Ravag kaj Modena de Aspangbahn, kort.-kons. Kühnelt kaj reg.-kons. Schlag de Bundesbahnen, kolonelon Kloss por la Wien-a brigadestro generalo Wiesinger, akad. pentriston Jänisch ktp.

Senkulpigis sian foreston la prezidanto de la respubliko d-ro Hainisch, urbestro de Wien Seitz, policprezid. Schober.

Estu permesate al mi, direkti kelkajn vortojn de plej sincera danko en la nomo de la aŭstria esp.-istaro al la ĉefo de la firmo, kiu hodiaŭ nin gastigas. Kom.-kons. Falnbigl jam de pli longa tempo montris grandan intereson ankaŭ al la praktika flanko de la mondtrafika lingvo kaj esprimis sian intereson per sia eksterordinara subteno kaj helpado al nia ekspozo. La firmo Herzmansky estas entrepreno de UEA., kiu havas delegitojn en 1596 lokoj en 69 ŝtatoj. Mi ne bezonas aldoni, ke jam per tio Herzmansky estas konata en la tuta mondo. Certe ne malutilus al nia komerco, se ĉi tiu ekzemplo havus multajn imitantojn.

La malfermota ekspozo montru al la vasta publiko la eksterordinare rapidan disvastiĝon kaj multnombran uzadon praktikan de E. en la lasta tempo.

Mi petas s-ron min.-kons. d-ron Komenda, ke li afable malfermu la ekspozon!“

Tiu ĉi ekparolis:

„Hochverehrte Anwesende!

Gestatten Sie mir, Sie im Namen Ihres Ehrenschutzherren, des Herrn Bundesministers für Unterricht, willkommen zu heißen und Sie herzlichst zu begrüßen.

Wenn wir uns die Bedeutung des Esperanto vor Augen führen wollen, so müssen wir wohl die zwei Hauptrichtungen, in denen die Bedeutung liegt, überblicken. Die erste Richtung ist die ideelle, die andere die rein praktische. Die ideelle dürfte wohl das sein, hoffe ich, was man Völkerversöhnung nennen kann. Da das Verständnis einer Sprache seitens vieler Völkerschaften und Länder dazu beiträgt, heißt dies die Versöhnung in die Menschheit hineinzutragen. Das praktische Moment ist zweifelsohne etwas, was nur jene beurteilen können, die bei großen Tagungen oder Versammlungen Gelegenheit hatten, sich zu überzeugen, wie das Esperanto zwischen Leuten, die keine Verständigungsmittel hatten, diese Verbindung hergestellt hat. An diesen großen Tagungen, wo Leute aus aller Herren Ländern zusammenkamen, hat Esperanto ganz gewiß schon, wie die Literatur beweist, großen Nutzen gestiftet. Wenn wir die Nutzanwendung des Esperanto in Oesterreich uns vor Augen halten und es fördern wollen, so müssen wir in erster Linie darangehen, die Jugend mit dem Esperanto vertraut zu machen. Das zu tun, hat die Unterrichtsverwaltung, soweit es in ihren Kräften steht, nicht unterlassen. Sie hat vor allem sich vor Augen gehalten, daß die Förderung in erster Linie davon abhängt, tüchtige Lehrer vor die Kinder hinstellen zu können. So wurde vor 2 Jahren eine Prüfungskommission eingesetzt, die Lehramtsprüfungen für Volksschulen, Mittelschulen ꝛc. ermöglichte. Tatsächlich haben schon viele Lehrer die Prüfung abgelegt. Der Unterricht an den Schulen hat schon heute eine zufriedenstellende Grundlage gefunden.

Der Besuch der Kurse kann nicht von heute auf morgen ein großer sein, sondern wird erst im Laufe der Zeit anwachsen. Man bedenke, was an die armen Eltern und Schüler herantritt bei den Einschreibungen, wieviel Gegenstände angeboten werden, die alle nutzbringend sind, von denen aber nur einige gewählt werden können. Also müssen wir sagen: Seien wir froh, wenn heute schon ein kleiner Teil der Schüler sich für Esperanto entschließt, denn ‚Gut Ding braucht Weile'.

So hoffen wir, daß auf diese Art sich nach und nach das Esperanto festsetzen wird. Durch Worte kann eine solche Sache nicht gefördert werden, sondern nur durch Taten. Heute stehen wir vor etwas, das als neue Sache hinzutritt. Die Ausstellung, welche allen das vor Augen führen soll, was Esperanto geleistet hat, in welcher Art Esperanto verbreitet ist, wie es mit der Literatur steht. Hoffen wir, daß die heutige Ausstellung und die Tagung, die im Juni stattfindet, das beste beitragen werden, das Esperanto möglichst auch in unserem Gebiete zu verbreiten und daß es in Zukunft gedeihen möge wie bisher und immer weitere Kreise zuziehe. Das wünscht von ganzem Herzen Ihr Schutzherr, der Minister für Unterricht, in dessen Namen ich die Ausstellung für eröffnet erkläre.“

Poste s-roj Steiner kaj Smital kondukis la honorajn gastojn tra la ekspozejo klarigante al ili la interesajn objektojn.

Multaj — laŭ ilia propra eldiro — ricevis tute ne supozitajn impresojn.

La malfermo de la ekspozo estis disaŭdigata per „Ravag“ la saman vesperon en germana lingvo.

*

La 4. de junio je la sesa vespere okazis en „Alpendorf“ (Prater) kunsido de AED.-direktantaro kun la celo, fiksi la tagordon de la AED.-konferenco kaj prepari la elekton de la nova estraro. Poste amika vespero, bone vizitata, kie regis bonaj animstato kaj humoro.

Enkondukis la kongreson diservo en Minoriten-preĝejo, kie oni kantis la germanan meson de Schubert kaj la jezuito Berndl predikis en E. La preĝejo estis plenplena kaj AKLE. meritas dankon pro la bona aranĝo.

Duonon post la naŭa jam venis la unuaj kongrespartoprenantoj. Depost la 8. flirtis E.-flago en „Äußerer Burghof“ ĉe la enirejo al „Neuer Saal“, kiu, kvankam granddimensia, pleniĝis.

Kvaronon post la 10. la prezidanto de la prepara komitato, ĉefinspektoro Steiner, malfermis la kongreson per jenaj vortoj:

Tre estimataj kongrespartoprenantoj!

Permesu, ke mi en la nomo de la prepara komitato kore salutu vin. (germ.) Kun granda kontentigo ni salutas la fakton, ke tiom da distingaj personoj sekvis nian inviton tiel, ke ni povas komenci nian laboron antaŭsentante bonan sukceson. Mi petas mian anstataŭanton en la prepara komitato, s-ron Ĉech, laŭtlegi la elektproponon por la kongresprezidantaro.

Laŭ tiu oni per aplaŭdo elektis la s-rojn Steiner-prezid., d-ron Christanell-vicprez., Werner kaj Rogler-sekret., Smital-interpretanto kaj la prez. daŭrigas:

„Mi dankas en la nomo de la elektitoj pro la al ni pruvitaj honoro kaj konfido. Estante prezid. de la kongreso mi sentas min honorata, ke mi povas saluti la s-rojn vickancelieron W. Breisky por la kanceliero d-ro J. Seipel, min.-kons. d-ron Kramer por la ministro por instruaferoj Schmitz, min.-kons. d-ron Schneider por la ministro por komerco kaj trafiko d-ro Schürff, kort. kons. Leisching por urbestro Seitz kaj la urbo Wien, ofic.-kons. d-ron Möstl por landestro d-ro Buresch kaj la ekskancelieron, policprezidanton de Wien Schober. Mi dankas al la multnombre venintaj membroj el la honora komitato pro tio, ke ili honoris, nin per sia ĉeesto kaj precipe mi prezentas nian saluton al: Regna deput. Kunschak, ĉefredakt. Lill por regna deput. Tomschik, univ. prof. d-ro Ettmayer por la universitato, kort.-kons. prof. d-ro Schumann por la Teknika Altlernejo, lektoro Mayr por la Mineja Altlernejo Leoben, kort.-kons. landa lern.-insp. d-ro Wollmann por la prezid. de la urba lerneja konsilantaro por Wien regna deput. Glöckel, d-ro Hanuschka por landa kons. d-ro Beirer, kort.-kons. Winternitz por la fervojo liglanda, ĉefkonstrukons. Dörfler por ĝen.-dir. Modena, dir.-kons. d-ro Becker por dir. inĝ. Spängler, d-ro Pilz por ĵurnalistunuiĝo „Concordia“, kolonelo Reis ktp.

La ministro por laboro kaj socia administrado en Rumanujo s-ro Trancu-Jaŝi delegis al nia kongreso s-ron Fischer-Galac. Tre ĝojigis nin, ke ankaŭ esp.-istoj alilandaj venis partopreni en nia landa kongreso kaj salutas ilin el tuta koro. La samideanojn el ĉiuj partoj de nia respubliko kaj el Wien, ili ĉiuj estu bonvenintaj.

Alvenis telegramoj kaj salutleteroj de: Liglanda prezidanto Hainisch, kanceliero d-ro Seipel, ministro por armeaferoj Vaugoin, landestroj d-roj Buresch, Rehrl, Schumy kaj Schlegel, urbestro Seitz kaj Hoß, urbestro Muchitsch (Graz), urbaj kons. Kokrda kaj Richter, prezidanto de aŭstria deputitaro Miklas, regna deput. Tomschik, princĉefepiskopo d-ro Rieder-Salzburg, ĉefepiskopo d-ro Pfluger, Generalo de Calasantinoj P. A. Maria Schwarz, rektoro Molisch-universitato Wien, rektoro Seidler-Teknika Altlernejo, rektoro Köck-univ. Graz, rektoro Brell-Leoben, landa lern.-insp. kort. kons. d-ro Güttenberger, prez. de kleriga domo „Wien-a Urania“ univ. prof. Lampa, eksekcia ĉefo Haas-prez. de „Lichtbildstelle“, prez. de Wien-a foiro kom.-kons. Hochmuth, prez. de fremdultrafika komisiono Müller, policdirektoro d-ro Schultz, prez. de la ĉambro por komerco, metio kaj industrio Tilgner, nia Schamanek, ĝen.-dir. kort.-kons. Wertheimer de DDSG.; E.-grupo kaj s-roj Wimmer kaj Schmirl-Steyr, d-ro Blaas-Innsbruck, dir. Mayr-Pystian. Plue el eksterlando: ICK.-Genève, LKK.-Danzig, Heroldo de Esperanto-Horrem, Germana E.-Asocio-Berlin, Germana E.-Ligo en Ĉeĥoslovakio, Foiro de Lyon, Sveda jarkunveno-Stockholm, s-ro Grigoriev-Ellamas (Estonio), s-ro W. H. Coventry-Surrey (Anglujo), Svisa Esp.-Societo Genève.

Ĉiujare estas aranĝataj univers. kongresoj de E., ĉiufoje en alia lando, la unua okazis en Boulogne 1905, la XVI. en Wien 1924 kaj la XIX. nunjare en Danzig.

Ankaŭ la unuopaj landoj havas siajn ĉiujarajn kongresojn kaj ni nun nian sepan aŭstrian en Wien. La kongreso servas por priparolado de la komuna laboro kaj la traktadoj okazas senescepte en E.

En la lasta tempo la progreso de la movado por intern. trafiklingvo estis tiel salterapida, ke, same kiel en aliaj landoj, ankaŭ ĉe ni la publika opinio lamante sekvas tiun ĉi evoluon.

Pro tio ni opiniis necese, ebligi al la publiko, per ekspozo konvinkiĝi pri la progresoj de la movado kaj la praktika apliko de monda trafiklingvo kaj ties tiala neceso.

Kom.-kons. Falnbigl, la ĉefo de la firmo Herzmansky por ĉi tiu celo disponigis al ni afable la tutan duan etaĝon de la ĉefkonstruaĵo Wien, VII., Stiftg. 3, kaj ĉiel akcelis la aranĝon. Pro tio mi esprimas al li la dankon de la aŭstria esperantistaro tute publike. Necesas, ke ankaŭ tiuj personoj, kiuj jam iomete amikiĝis al E., per la ekspozo sin pli bone informu pri E., ĉar jam eksendas kelkaj Radio-sendiloj siajn informojn en E., por tiel servi al pli granda publiko. Estas do nur demando pri la tempo, kiam ĉiuj iom grandaj stacioj sekvos tiun ĉi ekzemplon.

Nome de nia kongreso mi plej kore dankas al la estimindaj reprezentantoj de la gazetaro pro la komprenema intereso pri la ekspozo kaj direktas al ili la insistan peton, ke ili bonvolu ĉiam perage helpi la lingvon internacian, memorante sian profesion, esti edukantoj de la popolo; ĉar E. laŭ la grandegaj progresoj de la trafika tekniko sin prezentas neĉirkaŭirebla necesaĵo."

Sekvis jenaj paroladoj:

Eksvickanceliero W. Breisky:

„Werte Damen und Herren! Ich habe die Ehre, Ihnen die Grüße des Herrn Bundeskanzlers Dr. Seipel zu überbringen und seine besten Wünsche für die Erfolge der 7. österr. Esperanto-Tagung. Der Herr Bundeskanzler hatte bestimmt die Absicht zu kommen, war aber im letzten Moment beruflich verhindert und hat mich beauftragt, Ihnen seine besten Wünsche zu überbringen.

Meine sehr Geehrten! Der Weltkrieg hat eine große Lücke in die Beziehungen der Völker und Staaten gerissen und wir haben in der Folge beständig die Klage gehört, daß das Fehlen dieser Beziehungen eine wesentliche Ursache der Krise sei, die sich über die ganze Welt, besonders aber über Europa erstreckt. Es ist vielleicht ein Ruhmestitel für Österreich, daß unser Land das erste war, welches damals die Initiative ergriffen hat, um die Beziehungen zwischen den gespaltenen Völkern auf geistigem Gebiete wieder herzustellen. Unser Herr Bundespräsident Dr. Hainisch hat durch die Einrichtung internationaler Hochschulkurse an der Wiener Universität den Willen zur Wiederherstellung der Völkerverständigung bekundet; es hat sich gezeigt, daß, wo ein guter Wille zur Verständigung, auch der Weg hiezu gegeben ist. In diesem Bestreben nach Völkerverständigung zeigt sich großes Bedürfnis nach einer gemeinsamen Sprache und es ist ein großes Verdienst der Esperantobewegung, daß sie diesem Bedürfnis entgegenkommt und den Völkern eine einfache Sprache für das Volk in die Hand gibt. Ich glaube, daß die Esperantobewegung der Menschheit noch große Dienste leisten wird. Die Idee des gegenseitigen Verstehens erfordert, daß man sich vor allem kennen lernen muß, das heißt die Existenzbedingungen der Staaten und Völker. Und dieses Kennenlernen bedeutet eine Annäherung im Sinne der gegenseitigen Verständigung. Darin dient die Esp.-Bewegung einem hohen Menschheitsziele. Und von diesem Gesichtspunkte aus kann auch die Regierung mit aufrichtiger Sympathie Ihre Arbeit begleiten und die besten Wünsche für den Erfolg Ihrer Tagung zum Ausdruck bringen."

(Resume: La registaro kun sincera simpatio observas la laboron de la esp.-istaro, kies granda merito estas, esti doninta al la popolo simplan lingvon por la interkomprenado, kaj opinias, ke la E.-movado ankoraŭ faros grandajn servojn al la homaro.)

Ministra konsil. d-ro Kramer:

„Sehr verehrte Damen und Herren! Es gereicht mir zur besonderen Ehre, Ihnen die Grüße und besten Glückwünsche des Herrn Unterrichtsministers Richard Schmitz überbringen zu können. Die oberste Unterrichtsbehörde sterreichs verfolgt die Bestrebungen der Esp.-Bewegung mit lebhaftem Interesse und warmer Sympathie. Ist sie doch eine wertvolle Bundesgenossenschaft in der Verwirklichung der Aufgaben der Bundesschulverwaltung: Erweiterung des geistigen Horizontes und Näherbringung der Menschen, überhaupt Veredlung der Menschen. Auf diesem Wege bedeutet dieser Kongreß sicher einen Markstein. Daher wünscht die Unterrichtsverwaltung Ihrer Tagung einen angeregten Verlauf und vollen Erfolg."

(Resume: La plej supera instruestraro de Aŭstrio sekvas la klopodojn de la esp.-istaro kun vigla intereso kaj granda simpatio, vidas en ĝi valoran kunbatalantaron por efektivigo de siaj taskoj: pliampleksigo de la spirita horizonto kaj alproksimigo kaj plinobligo de la homoj.)

Min.-kons. d-ro Schneider:

„Vom Bundesministerium für Handel und Verkehr ist mir der ehrenvolle Auftrag zuteil geworden, hier in Ihrer Mitte zu erscheinen, um Sie auf das herzlichste zu begrüßen. Das Bundesministerium f. Handel u. Verkehr begleitet mit der wärmsten Sympathie Ihre Bestrebungen. Handel und Verkehr brauchen ja als erste Voraussetzung, daß die Menschen einander verstehen, miteinander sprechen können. Dann erst können sie die Beziehungen in materieller und geistiger Kultur aufnehmen und pflegen. Ihnen ist in der wertvollen Aufgabe, zum Bau der Völkergemeinschaft beizutragen, das Ziel gesetzt, Ihre Sprache zum Gemeingut möglichst vieler, ja möglichst aller zu machen, damit die Menschen über die Grenzen hinweg, die ihnen heute noch so vielfach gesteckt sind, frei miteinander ver-

kehren können. Deshalb beglückwünscht Sie das Bundesministerium f. Handel u. Verkehr zu Ihren Erfolgen und wünscht auch Ihrer heutigen Tagung das Beste."

(Resume: La unua premiso de komerco kaj trafiko estas, ke la homoj reciproke sin komprenu kaj povu paroli inter si. La valora tasko de E. estas, ĝin efektivigi. Pro tio la ministro gratulas pro la ĝisnunaj sukcesoj.)

Kortega kons. d-o Leisching:

„Herr Präsident, werte Versammlung! Der Herr Bürgermeister, der durch Amtsgeschäfte verhindert ist, hat mich beauftragt, ihn und die Stadt Wien bei ihrer Versammlung zu vertreten und Ihnen die herzlichsten Glückwünsche zum Ausdruck zu bringen. Sie haben sich hier versammelt, um den Weg zu überblicken und die hohen Ziele, die Sie sich gesetzt haben, immer klarer zu erkennen, weiters Ihrer Bewegung wieder neue Impulse zu geben, um sie in immer reicherem Maße der Erfüllung zuzuführen. Wir Alten erinnern uns noch wohl der Anfänge Ihrer Bewegung.

Ich selbst erinnere mich aus meiner Jugend, wie schwer es denen, die sie eingeleitet, fallen mußte, ihr eine Würdigung in verschiedenen Arbeitskreisen zu verschaffen. Selbsverständlich waren da Zweifel, Nörgler und Spottsucht. Aber es ist Ihrem Ernste, Ihrer Klugheit und Zielsicherheit gelungen, Ihre Ziele immer klarer zu erkennen, zu verbreiten und zu festigen. Es ist eine große Aufgabe, der Sie sich widmen.

Selbstverständlich ist es nicht die Aufgabe des Esperanto, die hohen geistigen Werte der natürlichen Sprachen auch nur herabsetzen oder gar verdrängen zu wollen.

Aus Ihren Bestrebungen ist ein Verständigungsmittel über die Grenzen von Völkern und Staaten erwachsen, das vielen praktischen Aufgaben, aber auch idealen Zielen zu dienen hat. Unter den praktischen Aufgaben befindet sich vor allem der wirtschaftliche Verkehr von immer größerem Umfange, unter den ideellen vor allem die, ein geistiges Werk zu schaffen, um auch denen, die nicht mehrere Sprachen sprechen, zu ermöglichen, gemeinsame Angelegenheiten zu besprechen und zu beraten. Von diesem Gesichtspunkte kann ich nicht anders, als Ihre Erfolge mit großer Freude zu begrüßen.

Es wurde heute schon gesagt, daß der Krieg die Menschen auseinandergebracht hat. Aber zu den Folgen des Krieges gehört auch die Vertiefung Ihrer Bewegung, dem Streben nach Verständigung zwischen den Völkern, das aus der menschlichen Seele nicht mehr herauszureißen ist.

Die Stadt Wien begrüßt Ihre Tagung auf das herzlichste.

Auch als Präsident des Wiener Volksbildungsvereines muß ich sagen, daß Ihre Bestrebungen die größte Aufmerksamkeit verdienen. . . Ich begrüße Sie nochmals im Namen des Herrn Bürgermeisters und der Stadt Wien in der lebhaften Hoffnung, daß Ihnen die besten Erfolge zuteil werden."

(Resume: Maljunuloj ankoraŭ memoras, kiom malfacile estis por la unuaj pioniroj de E., ĝin propagandi. Sed al ilia seriozeco, saĝeco kaj celkonscio prosperis disvastigi kaj fortikigi siajn celojn. Ideala celo estas havigi al ne scipovantoj de pluraj lingvoj spiritan labor- kaj batalilon. Li ankaŭ mencias, estante prezidanto de Wien-a Popolkleriga Unuiĝo, ke niaj klopodoj meritas plej grandan intereson.)

Ofica kons. d-ro Möstl:

„Sehr geehrte Damen und Herren! Tre estimataj samideanoj! In Vertretung des Herrn Landeshauptmannes von Niederösterreich Dr. Buresch und des Herrn Landesamtsdirektors Kastner habe ich die Ehre, Ihnen zur heutigen Tagung die Glückwünsche der niederösterreichischen Landesregierung zu überbringen. Ich bin ermächtigt, Ihnen die Versicherung abzugeben, daß die Landesregierung und ihr Amt in jeder Weise die Esp.-Bewegung unterstützen wird.

Weiters vertrete ich auch den gewerblichen Fortbildungsschulrat für Niederösterreich. Auch dieser wird stets ein wahrer Freund der Esp.-Bewegung sein.

Für mich ist es eine große Freude und ein großes Glück, daß ich zu Ihrem Kongresse delegiert wurde. Ich selbst bin schon seit zwölf Jahren ein eifriger Anhänger der Esp.-Bewegung.

Kunhelpu tiu kongreso, por ke Esperanto progresu kaj konkeru iom post iom la mondon!"

(Resume: La parolanto estas rajtigita, certigi la kongreson, ke la landa registaro de Malsupra Aŭstrio kaj ties oficejo ĉiel subtenos la E.-movadon.

Ankaŭ la lerneja konsilantaro por metiaj lernejoj en Malsupra Aŭstrio, kiun li ankaŭ reprezentas, estos ĉiam sindona amiko de Esperanto!)

Ekskanceliero, policprezidanto de Wien Schober:

„Meine sehr geehrten Damen und Herren! Mit aufrichtiger Freude bin ich der Einladung in das Präsidium der siebenten österr. Esperanto-Tagung nachgekommen und mit aufrichtiger Freude ergreife ich auch hier das Wort und begrüße diese nicht nur in meiner Eigenschaft als Chef der größten Sicherheitsbehörde Österreichs, sondern auch im Namen der intern. kriminalpolizeilichen Kommission, deren Präsidium ich seit vier Jahren innehabe. Auf dem intern. Polizeikongresse in Wien im Jahre 1923 hat die Frage der Esp.-Bewegung eine große Bedeutung erlangt. Es ist auf diesem Kongresse in mehreren Referaten der Vorschlag aufgetaucht, das Esperanto zur intern. Verständigungssprache der Sicherheitsbehörden zu machen. Ich darf wohl für mich in Anspruch nehmen, daß ich diese Bewegung auf den seither erfolgten Tagungen der intern. kriminal-

polizeilichen Kommission nicht zur Ruhe kommen ließ.

Ich darf auch der verehrlichen Versammlung vorbringen, daß die Esp.-Bewegung in der Wiener Polizei sichtlich erfolgreiche Fortschritte gemacht hat. Denn Sie sehen ja heute in diesem Saale wie seit längerer Zeit im Straßenbilde Wiens, daß Sicherheitsbeamte mit der Tafel „Esperanto“ und dem grünen Stern Dienst machen.

Herr Hofrat Leisching hat heute schon hervorgehoben, daß es nicht die Aufgabe des Esperanto ist, die nationalen Sprachen zu verdrängen. Weil aber heute die alte Diplomatensprache Französisch schon lange nicht mehr ausreicht und das Esperanto als wirklich neutrale Verständigungssprache sich auf allen Gebieten immer mehr und mehr durchzusetzen beginnt, so verspreche ich hier, im Rahmen meines Wirkungskreises die Esperanto-Bewegung nach Kräften jederzeit zu fördern und mit diesem Versprechen wünsche ich Ihrer Tagung den besten Erfolg. Sekve la signifo de Esp. kiel neŭtrala lingvo estas akceptita kaj mi promesas, ke mi volas favori la Esp.-movadon en mia oficejo laŭpove. Tion ĉi promesante, mi deziras al via festkunveno la plej grandan sukceson!“

(Resume: Salutas ne nur estante ĉefo de la plej granda polica estraro de Aŭstrio, sed ankaŭ nome de la intern. kriminalpolica komisiono, kies prezid. li depost 4 jaroj estas. Akcentas, ke li ne lasis trankviliĝi la movadon por enkonduko de E. kiel intern. lingvo de la policaj estraroj en tiu komisiono. Ĉar la malnova lingvo de la diplomatoj, la franca, jam delonge ne sufiĉas kaj E. en ĉiuj sferoj pli kaj pli venkas, li promesas ĉi tie, en la kadro de sia agadsfero ĉiam akceli laŭpove la Esp.-movadon.)

Okazis fotografado de la prezidantaro kaj de la kongresanaro en la salonego.

Poste sekvis paroladoj de s-roj regna deput Kunschak, ĉefred. Lill, univ.-prof. d-ro Ettmayer, kort.-kons. prof. d-ro Schumann, landa lern.-insp. kort.-kons. d-ro Wollmann, dir.-kons. d-ro Becker, d-ro Pilz.

Post ĉiu parolado granda aplaŭdo.

Ni publikigos la tekstojn de la paroladoj en la venonta A.E., ĉar mankas en ĉi tiu al ni la loko!

Poste s-ro Smital deklamis la unuan ŝtrofon de prologo, verkita kaj dediĉita al la kongreso de nia kolonelo Zwach.

Salutis la kongreson per unu frazo nacilingva kaj daŭrigante en E. f-ino Hokova (Praha), s-roj Lempert (Estonio), Wasilief (Bulgario), Klein (Hungario), d-ro Mildwurf (Polujo), Sonnenfeld por la esp.-istoj en Brünn, plue d-ro Friedl el Graz en la nomo de la esp.-landestraroj aŭstriaj kaj P. Mestan en la nomo de IKUE, kies prez. li estas, kaj AKLE.

S-ro Rogler dankas en la nomo de la aŭstria esp.-istaro al la prepara komitato precipe al ties prezidanto pro la bone sukcesintaj kongreso kaj ekspozo.

D-ro Sós parolis en E. pri la temo „kultura signifo de Esperanto“ kaj fine prof. d-ro Longo en germana lingvo pri „la nuna stato de la Esperanto-movado“.

La E.-paroladojn s-ro Smital bonege prezentis laŭ enhavo (pro manko da tempo) en germana lingvo, kio tre interesis la gastojn.

Pro jam malfrua tempo d-ro Halbedel-Graz rezignis je sia parolado en E. kaj prof. d-ro Longo-Mödling devis mallongigi la sian, kion certe la ĉeestantoj tre bedaŭris.

Je la unua post kanto de unu ŝtrofo de la himno, kiun akompanis s-ro Chyba sur la fortepiano, la prezidanto fermis la kunsidon.

Sekvis fotografado sur la ŝtuparo antaŭ la ĉefenirejo de „Neue Hofburg“ (Bildoj 24:30 po Ŝ. 2·50 kaj en formato de poŝtkartoj po 50 gr. haveblaj de Esp.-Kongres-Komitato, Korneuburg, Postfach. Mendu poŝtenpagilon. Kun afranko la malgrandaj bildoj plialtiĝas je 5, la grandaj je 15 gr. po peco.)

Komuna promenado al tagmanĝo en Stadttheaterkeller, VIII., Daung 1, kiu kontentigis la stomakojn de la jam tre malsataj esp.-istoj.

Je la tria la kongresanoj veturis per tramoj al Grinzing kaj de tie iris sur bela vojo al Kobenzl, kie okazis vere bela kaj granda AED.-laborkunsido, pri kiu estas raportata aliloke. Vespere je la naŭa ni reveturis al Wien.

La vetero, kiu dimanĉe antaŭtagmeze estis pluva, favoris nin dum la tuta kongrestempo.

Lunde matene estis nia renkontejo en Meidling-Südbahn, de kie ni pli ol 120 veturis al Baden. Antaŭ la stacidomo atendis nin oficejestro Holzer de

la komunumo Baden, kiu kondukis nin al „Kurpark“. En „Kursalon“ la vicurbestro Brusatti bonvenigis nin per saluto en Esp. kaj per koraj vortoj. Lin respondis s-ro Steiner, kiu esprimis la dankon de la ekskursanoj pro la bela akcepto kaj la gastamo de la urbestraro de Baden. Sekvis kelkaj vortoj de d-ro Sós.

S-ro Holzer poste montris al ni „Originfonton“ kaj „Kurpark“, kie ni ĝuis ĝis 1/2 1 h. la fame konatan koncerton kaj post tiu komuna kontentiga tagmanĝo unuigis nin en „Winzerhaus“.

Je la 3. ni vizitis „Mariofonton“ kaj poste „bordbanejon“ (por ni senpaga eniro). Parto restis por bani (ekstreme rabatita prezo), la alia ekskursis al Helenental, supreniris ruinon Rauhenstein kaj fine trinkis bonan kafon sur „Hauswiese“.

Ni esprimas nian dankon al la urbo Baden, ties urbestroj s-roj Kollmann kaj Brusatti kaj al s-ro Holzer.

Vespere hejmveturado al Wien.

La 7. de junio vizito de la ekspozoj laŭ programo. St.

Resumo kaj perspektivoj.

Rück- und Ausblick.

Landesschulinspektor Hofrat Dr. Franz Wollmann.

Certe al la plej belaj kaj impresaj manifestacioj de la aŭstria E.-movado apartenas la E.-ekspozo, malfermita la 27. de majo nj. en grandmagazeno A. Herzmansky kaj la ĝin sekvinta pentekosta kongreso de la aŭstriaj esperantistoj.

Multe pli bone ol vortoj skribitaj aŭ parolataj tion povus, la riĉenhava ekspozo montris la historion kaj disvastigitecon de E., ĝian ampleksan literaturon tradukitan kaj originalan en ĉiuj kampoj de la vivo spirita kaj krome la modernajn kaj laŭinfanajn metodojn de la E.-instruo. Certe neniu pensema vizitinto povis ne senti la potencan propagandan forton de ĉi tiu tre dankinda ekspozo.

Ke la praktikaj kaj idealaj celoj de la E.-movado ĉiam pli estas ekkonataj kaj rekonataj, tion pruvis la partopreno kaj eksternorme laŭdaj vortoj de la reprezentantoj de niaj plej superaj estraroj regnaj, land- kaj komonumaj same okaze de la malfermo de l' ekspozo kiel prezipe ĉe la brila sepa aŭstria E.-kongreso en la harmonie bela Nova Salonego de la eksimperiestra kastelo. Ĉiu el la multnombraj partoprenantaj sentis: Jen parolas viroj, kiuj ĝuste perceptis la grandiozan penson pri estonto kun tutmonda lingvo, kiu peras inter ĉiuj landoj; viroj, kiuj rilatas al tiu penso kun plena kompreno kaj varma koro kaj kiuj estas pretaj laŭpove akceli ties efektivigon.

Die im Kaufhaus Herzmansky am 27. Mai d. J. eröffnete Esperanto-Ausstellung und die darauffolgende Pfingsttagung der österr. Esperantisten in Wien gehören wohl zu den schönsten und eindrucksvollsten Kundgebungen der Esperantobewegung in Österreich.

Weit besser, als geschriebene oder gesprochene Worte es vermögen, zeigte die reichhaltige Ausstellung die Geschichte und Verbreitung des Esperanto, seine reiche Übersetzungs- und Originalliteratur auf allen Gebieten des geistigen Lebens und die zeit- und kindgemäßen Methoden des Esperanto-Unterrichtes. Der mächtigen Werbekraft dieser sehr dankenswerten Ausstellung wird sich wohl kein denkender Besucher haben entziehen können.

Daß die praktischen und idealen Ziele der Esperantobewegung immer mehr erkannt und gewürdigt werden, das bewiesen die Teilnahme und die außerordentlich anerkennenden Worte der Vertreter unserer höchsten Bundes-, Landes- und Gemeindebehörden sowohl bei der Eröffnung der Ausstellung wie ganz besonders bei der glänzend verlaufenen 7. österr. Esperantistentagung in dem stimmungsvollen Neuen Saale der ehem. Hofburg. Jeder der zahlreichen Teilnehmer hatte das Gefühl: Hier sprechen Männer, die den großen Zukunftsgedanken einer länderüberspannenden Weltvermittlungssprache richtig erfaßt haben, ihm mit vollem Verständnis und warmem Herzen gegenüberstehen und seine Verwirklichung nach Kräften zu fördern bereit sind.

Pri la sukceso ĉiuj kunlaborintoj, precipe la meritplena prezidanto s-ro ĉef-inspektoro Steiner, povas ĝoji. La bela bildo de ambaŭ aranĝoj estu instigilo al senlaca plulaborado en la servo de la E.-movado kaj samtempe garantio por pluaj sukcesoj.

Möge der schöne Verlauf dieser beiden Veranstaltungen, deren Erfolg alle Mitarbeiter, insbesondere den verdienstvollen Präsidenten Herrn Ob.-Insp. Steiner herzlich freuen darf, ein Ansporn zu unermüdlichem Weiterarbeiten im Dienste der Esperantobewegung und zugleich eine Bürgschaft weiterer Erfolge sein.

Besuchen Sie noch in letzter Stunde unsere Ausstellung; sie bleibt bis 25. Juni (8—18 Uhr) **werktags geöffnet. Eingang** Stiftgasse 3.

Machen Sie Ihre Bekannten auf den neuen Radio-Kurs aufmerksam. Anfangs Juli bis Ende September.

WIEN-AJ POLICISTOJ PORTAS LA E.-INSIGNON KUN LA VERDA STELO.

Per reskripto n-ro 789/Z. J. — 27 la polica prezidanto permesis, ke ĉiuj esperantlingvonkapablaj policistoj povas porti dum kaj ekster dejoro la verdan stelon.

Sur la maldekstra brustflanko ili portas nikelumitan metalŝildon (3 : 10 cm), sur kiu estas la vorto „Esperanto" kaj la verda stelo.

La unuan fojon la policistoj portis la novan insignon dum la VII. Aŭstria Esperanto-Kongreso.

Dankon al polic prezidanto Schober kaj gratulon al la polica grupo kaj ties estro s-ano Hirz.

Esperanto-vojaĝoj tra Aŭstrio.

„Espervoko" (Aŭstria E.-vojaĝa komit.) aranĝas la 12. VII. kaj 7. VIII. vojaĝojn tra la bela Aŭstrio. Daŭro 13 tagojn, prezo S. 375.—, eliro el Salzburg aŭ 4 tag. poste el Wien. Vizitontoj de la Danzig-a kongreso havos okazon vidi nian landon. Detalojn kontraŭ respondkupono de „Espervoko", Wien, I., Hofburg, Batthyani-Stiege, 2. Stock.

Varbado por Esperanto.

A. E. n-ro 5 estas la plej taŭga varbilo por ĉiu grupo kaj unuopulo. Sendu aŭ transdonu ĉi tiun numeron al ĉiuj eminentuloj (land-, distrikt-, urbestroj, ĉiuj lernejinspektoroj, unuiĝoj neesperantistaj, ne forgesu eĉ unu el tiuj kaj el la lernejoj) kaj al ĉiuj lernejoj de via urbo kaj distrikto kaj vi vidos en aŭtuno la efikon.

Ĉe ni en Wien ni spertis jam la valoron de ĉi tiu varbilo.

La eldon. de A. E. presigis pli grandan kvanton por propagandcelo kaj disponigas n-ron 5 po 10 pecoj je favora prezo da Ŝ. 3.— anstataŭ Ŝ. 5.— (24 paĝoj!).

Pripensu, se vi eble bezonas en Graz 80, la elspezoj estos Ŝ. 24.— kaj pli malmultekostaj ol aliaj varbiloj sukcesigaj!

Laborkonferenco de A. E. D.

la 5. de junio sur Kobenzl.

Estis reprezentataj 16 soc. el Wien kun 31 voĉoj kaj 6 el la liglandoj kun 15.

Prez. d-ro Christanell-Salzburg salute malfermas je la 16.40. D-ro Pfeffer salutas speciale la esp.-istojn ekster Wien.

Jena tagordo estis pritraktata:

I. Raportoj de: a) la prez., kiu ne plu volas akcepti pro tio, ke li el Salzburg ne povas tiel labori, kiel li opinias necese; b) sekr. dir. Feder (depost okt. 1926); c) gazetservestro d-ro Pfeffer; d) landestroj (Werner por Wien, Stanke k. Steiner por N.-Oe.; Bürger k. Cipera por O.-Oe.; d-ro Friedl k. Rogler por Stirio; d-ro Christanell por Salzburg; mankas raporto el Tirolo).

II. Organizaj proponoj:

1. de E.-soc. Danubio-Wien pri starigo de referatoj por: a) „Propagando per-esperanta, kiu penu utiligi E. p. turismaj, komercaj k. aliaj varbaferoj" . . . „kaj int. rilatoj de piedpilkludistoj ev. starigon de spec. esp.-ista ludistaro" (aldono Rogler) unuan. akceptita. b) „Organizo k. statistiko, per tio krei sisteman kunlaboron kun la landestroj k. grupoj.

Nomigo de korespondantoj de AED. en ĉiuj pli gravaj urboj de Aŭstrio kiuj raport. subtenu la laborojn de AED." unuan. akcept. c) „Ĉeĥaj, per tio akcelante la kunlaboron kun la ĉeĥaj ges-anoj en Wien", unuan. akcept. d) „Lernej- kaj instruaferoj, per tio ebligi celkonscian k. sukcesan laboron por fina enkonduko de E. en la diversajn lernejojn." Unuan. akcept. e) „E.-hejmo (s-ro Dittrich), per tio kreante E.-centron kaj ebligi plenan koncentrigon de nia movado. Fina celo estu, kiel diris d-ro Privat — ne nur sulki nian foson, ni ankaŭ konstruu nian domon —." Akcept. (1 voĉo kontraŭ).

2. „Aŭstria E.-Varb-Societo" (mallonga sciigo de s-ro Steiner, ke li fondas ĝin).

3. Pristatutaj prop. de E.-soc. por Stirio: a) „§ 18: Post la vorto . . . AED.-konferencon" estu anstataŭigata la punkto per komo kaj almetata la frazo: „. . . kiu en jaroj, dum kiuj estas aranĝata A. E.-kongreso, ĉiam okazu en la kongresloko dum la kongreso. Se kongreso ne okazas, povas esti kunvokata AED.-konferenco en tiun lokon, pri kiu konsentas la plimulto. Dum la menciita AED.-konferenco devas okazi ankaŭ la novelektoj de la prezidantaro kaj direktantaro." Unuan. akcept. b) „§ 9: Post la vorto . . . validas" estu envicigata la vorto: „ĝenerale". Post la vorto „. . . reelektataj" estu aldonata jena frazo: „Ĉiu grupo havas la rajton, ĉiutempe revoki ies delegitecon kaj elekti novan delegiton; ĉiuj ŝanĝoj devas esti anoncataj al la AED.-direktantaro kaj al la koncerna landestraro. Kun la perdita delegiteco senvalidiĝas ankaŭ eventuala funkcio en la direktantaro de AED." Post diskuto malakcept. 24 kontraŭ 17.

III. Novelektoj:

D-ro Pfeffer, atentigante pri la graveco, admonas al bona pripenso. Li dankas al s-ro Steiner pro la farita laboro por la kongreso kaj ekspozo.

La proponita listo:

Prezidanto: Ĉefinspektoro Steiner;
Vicprez.: Prof. d-ro Christanell-Salzburg, majoro Sinner-Wien, d-ro Blaas-Innsbruck, Rogler-Graz;
Ĝen.-sekr.: Bernfeld; sekr.: Werner, Weber k. Dittrich, ĉiuj Wien;
Statistiko: Estro Ĉech, kunlab. Klein;
Gazetservo: Estro d-ro Pfeffer, kunlabor.: Postl (por la germ. naciaj), Bischof (kristanaj), d-ro Jokl (ĉeĥaj);
Kasistoj: Mair, anstat. Ultmann, f-ino Müllner-Korneuburg;
Revizoroj: Klausnitzer-Wien, Ulbrich-Linz;
Propaganda fako: Kalk.-kons. Frey;
Lerneja fako: Dir. Feder;
Por Ĉeĥoj: Prof. d-ro Jokl;
Plue sen ofico: F-ino Gyra, s-ro Fantelo; prof. d-ro Longo-Mödling, Stanke-Krems; Lachmann-St. Pölten.

Akcept. (2 ne voĉdonis).

La noveelektita prez. Steiner ekprezidas kaj diras: „Mi dankas en la nomo de la elektitoj pro via fido. Ni nenion volas promesi, sed ni esperas, ke vi estu kontentaj. Por nia laboro necesas tri premisoj: 1. ke ĉiu unuopa elektito plenumu tutplene la devojn, kiujn postulas lia nova ofico, 2. ke ili laboru ĉiam interkonsente kun mi en plena fido (ne regu ia malfido), 3. ke la grupoj helpu nin per konstanta kunlaboro. Ni ĉiuj nun promesu, ke ni unuanime estu kontraŭ ĉiu, kiu per neobeo de la punktoj 1 kaj 2 malhelpas nian movadon, kiu nun per kunlaboro de ĉiuj fortoj havas post la bone sukcesintaj kongreso kaj ekspozo la plej bonan ŝancon por la estonteco. Sub tiuj kondiĉoj mi volonte akceptas la elekton.

IV. Propono (Steiner) pri anstataŭeblo de AED.-direktantaranoj kun aldono Klein: „La membroj de AED.-prezidantaro aliurbaj rajtas per skriba atesto sin anstataŭigi de unu membro de AED.-prezidantaro; sed ĉiu ano rajtas nur voĉdoni entute por 3 voĉoj. Akceptita (1 voĉo kontraŭ). Proponas Feder komunan E.-hejmon. (Ne decidita.)

V. Raporto (Steiner) pri aranĝoj por forigi la deficiton de la XVIa dum la konferenco en Praha (Paskoj).

VI. Rogler atentigas pri Germana E.-asocio kaj rekomendas aliĝon.

VII. Kotizo. Prop. Ĉech: Ŝ. 3.— por delegitrajto. Akceptita.

VIII. Diversaĵoj:

a) Letero de univ. prof. d-ro Konrad, kiu eldonas E.-resumon al „Gerlands Beiträge zur Geophysik“ (verk. de Simon kaj Sirk). Priparolota en venonta AED.-kunsido. b) Legolibro intern. de Bednař aperos kaj estos ricevebla nur laŭ antaŭmendo. Favora prezo nun sv. fr. 10.—. Mendu ĉe AE. c) A. E. kongresa-numero por grupoj havebla je favora prezo de 30 gr. d) Rogler kaj Halbedel esprimas la dankon al la prezidinto prof. Christanell. Fino de la kunsido je la 9. vespere.

Steiner, prez. Bernfeld, ĝen.-sekr.

Via helpo necesa!

La XVIa Universala Esp.-Kongreso en Wien 1924 certe signifis grandan sukceson por la E.-movado en Wien kaj Aŭstrio. Sed pro malfeliĉaj cirkonstancoj ĝi finis per deficito da 21.000 Ŝ. De tiu sumo S. 5000·— estas pagitaj ĝis nun. Restas ŝuldoj da Ŝ. 16.000·—, grandega sumo, kiu nun nepre devas esti pagata!

La kreditoroj atendis ĝis nun pacience je pago. Sed nun ili postulas iomete energie la monon kaj minacas per proceso.

Bonvolu afable pripensi kiom tia proceso malutilus nian movadon. Kiel malamikoj de nia movado eluzus ĉi tiun aferon! Kiu nun pagu la deficiton?

Kompreneble la esperantistoj el la tuta mondo, ĉar oni — jam laŭ morala vidpunkto — ne povas permesi, ke la membroj de la tiama kongreskomitato, kiuj jam donis sian laboron, forton, nervojn kaj monon por la kongreso, pagu denove! Ili ankaŭ ne estas en tia financa situo, ke ili povas pagi!

ICK. promesis alvoki la tutmondan esperantistaron, disponigi la rimedojn por fine forigi la deficiton. Ni aŭstrianoj montru, ke ni ne intencas postresti!

El ĉiu loko fervora samideano mendu tuj ĉe la ĉefdelegito de UEA. d-ro Sós, Wien, I., Tuchlauben 18, kajeretojn kun subvenciaj kuponoj po 50 g kaj vendu ilin en sia konatularo. La aliaj sendu afable donacojn senpere al d-ro Sós.

Montru vian samideanan spiriton!

Steiner, prez. Bernfeld, ĝen.-sekr.

Kiu prizorgos al 18 jara fervora esp.-isto (kontoristo senlabora) iun ajn laboron? Skribu al Maller Theod., Wien, XVII., Hauptstr. 58, II/7.

Posedanto, administranto, eldonanto kaj respondeca redaktoro Hugo Steiner, Bisamberg 248.
Presejo: Gesellschafts-Buchdruckerei Brüder Hollinek, Wien III, Steingasse 25.